

PENSEO

N-ro 260

jun. / 2013

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 24-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

Anteo (Ĉinujo)




memordiko

eĉ sen subteniloj
la barbfadenoj penas kapti kozon en aero.
florado estas instinkta,
malgraŭ ke la frukto apartenas nur al sorto.



malsano longviviga

malsano longviviga faras al mi mavan sangon.
ensonĝa la pereco de la homo kaj la dinosaŭro
okazas ĉe mia palpebrumo, kiam deciduaj
arboj
grimpos sur la kapon plenan de veneno naja.




mi havas okulojn pli grandajn ol la ventro

estante bebo,
mi kuras sur la lakta vojo.
la piedo glitas kaj la korpo falas teren,
sed la kapo sunen flugas for del trunko.

Estas varme

eĉ en fajro nudo malas al moralo.
mi kuŝas en vatita jako sur la maro.
sub gvata lumturo fiŝino min fikas pro-mise.
ĉe vekiĝo mi dronigas aviadilŝipon pise.



Sen frukto

vakuo balonigas kapon plumboplenan.
vortoj en stalo volas fuĝi.
la fontoplumo staras foje kaj refoje.
blanka la inko ŝprucas sur kotonan nubon –
nulo.

Mikaelo Bronsxtejn (Rusujo)



Sentifolo

Fojfoje favorata
de l' flugilhava sort',
per biciklet' trirada
mi penas iri sor.
Sukcesas foje l' peno,
sed en transnuba alt'
zorgigas falreveno
al duro de l' asfalt' ...

Cezar (Germanujo)



Foje supre, foje sube,
ŝvebas mia sprit' en blu'.
Ĉu balone aŭ ĉe-rube,
min ne kaptas la enu'.

Tra la park' mi iras lante

pro la nuboj en ĉiel'.
En kvieto kaj verkante,
gvidas min plezura cel'.

En la tagoj, en nokthoroj

pensas mi pri la belec',
pri scienco kaj furoroj,
pri magia eterneĉ'.

Tamen vivas mi surtere,

foje trafas min sufer'.
Sed mi strebas plu sincere
kaj al amo kaj al ver'.

Kun estim' kaj malestimo

vivas mi en nia mond',
dum labor' sen iluzioj,
kvazaŭ kiel mara ond'.

Min vivtenas ina ĉarmo,

kaj mi miras plu kaj plu,
ke brakum' kaj ina varmo
serenigas min sen bru'.

Vivojaroj laŭ folioj

falas for de vi kaj mi.
Mi ne p lendas plu al dioj,

mankas iam sentebri'.

La plej multaj simple fias
en la a ĉa monodram',
sed pro vi mi ĉiam sci a s,
ke ekzistas dec' kaj am'.

Se mi iam devos morti,


jen kun kis' de vi, edzin'.
Se mi devos eksenvorti,
tenu vi permane min.

En la tomb' mi petos pacon,

birdokantojn eĉ por ni,
por babiloj erinacon,
sed vizitojn ja de vi.

Steloj supre kiel oro


brilu hele sen instru'.
Kaj vi hejme jam en foro
dormu bone sen enu'.




Alte flugantaj pensoj

Mi flugas alte en aer',
ne rampas kiel verm' sur ter'.
En mia propra alta sfer'
mi estas aglo de liber'.

Se vi ne alte flugas, hom',
 vi estos ĉiam verm' en dom'.
 Ekflugu do kun fantazi',
 libero estas, hom', vizi'!



Paŭlo Silas (Brazilo)



DUECO

Ide' disigita kiu trovis l' aserton
 Kaj lol' oksimora kiu kisas la spelton,
 Per via severa liniilo,
 La tempokurbiĝon vertikale glatigu.

Zenit' alkonduku ĝis malsupra nadiro.
 Eter' dudirekten transtrafiku.
 Por fakte ebligi, ke proksimiĝu maloj;
 Kunigi konceptojn, malsimetriaajn parojn.

La floron kolerincitas volvotigo.
 Matrac' nobelulon priplendas: mankas silko!
 Neniu el ili deziras kontraŭpezon.

Pro tio, ĉe akrrandaj tranĉarmiloj,
 Fendiĝos defendocelaj mensaj ŝildoj.
 Kaj ĉiuj kunĝuos l' esencan antitezon.



Mori (Usono)




Ĉielo

En songo mi ekrenkontis stelon
 glue ĉirkaŭprenis ĝian kolon
 kune kun ŝi mi disiĝis de l' tero
 por ĉiam mi eniris la ĉielon!



Leieladonna (Meksikio)



Allogo

Brilegoj...
 al splendo,
 vi povas vidi...
 Kiom da brilegoj plu?
 Veloj al la ĉielo...
 vento kaj blua,
 splendoj el iu brilo
 tiel feliĉa,
 tiel digna kaj aroganta
 vi havas rideton,
 plena...
 kaj vi estas tiel bela,
 kaj tiel pura
 vi estas tiu brilego
 kiu transiras diste,
 la maro kaj ĝia splendo.
 Via voĉo...
 via bela rideto
 via oferemo,

via fordonemo;
 Tiel granda vi estas...
 kiom da amo trovas sin en vi...
 tiel fiera...
 la floroj tie,
 ĉeestaj,
 via haŭto...
 blanka kiel via animo,
 via tenereco...
 mi ĉion vidas en vi.
 Kial mi amas vin ?
 Mi vidas vin...
 tiel fremda,
 tiel brila,
 kiel la suno...
 Mia suno...
 Tiu suno kiu varmigas,
 kaj brulas...
 kiom de sentoj...
 kiom da nostalgio...
 kiom da atendo...



PETRO PALIVODA (Ukrainio)

Evoluo

senhejma hundo
 feliĉon havis
 sed duone
 ĝi trovis sur balaŭfejo
 peceton da kolbaso
 sed tuj ricevis ĝia dorso
 senprokraste
 celtrafan frapon
 per bastono
 de vagabondohomo

konkuranta
 ĝi devas ja memori
 ke homo estas
 krono de l' Naturo



Tempo

Tempo kuras trankvile kaj kutime,
 ne ĉiu sekundo martelas tempiojn,
 ili estas malrapidaj, molaj kaj varmaj
 kiel lulkanto.

Sed okazas, ke estas rompata
 ritmo de kvietiĝinta muziko de l' tempo
 kaj iu ribelanta sekundo
 forlasas sian orbiton
 kaj sciigas la mondon pri sia ekzisto –
 neretenebla, malmola, malvarma –
 ĝi krias, eĉ en oreloj sonoras:
 Vi tiel malmulte sukcesis fari!




Siv Burell (Svedujo)



Tro multe da televido

La televido englutis la knabon
 Ĉirkaŭaĵon li nek vidas, nek aŭdas.
 Tagon la patrino venante
 interrompis la vidadon dirante:

“Iu malĝojo okazis –
onklo Lars tagmeze forpasis ”.
”Vere”, diris la knabo,
restante en mondo de krimoj,
”kiu mortpafis lin?
Aŭ ĉu li mortis pro vundoj de
glavoj?”



La franca Esperanto-kastelo Greziljono invitas
vin al interesaj semajnoj:

somera programo (semajnoj turisma,
artamatora, alternativa, infana, teatra),
aŭtuna feriado oktobrofine kaj al jarfina festego
kun novjara festeno.

Vidu detalon rete en www.gresillon.org/somero
aŭ gresillon.org/agendo

Kontaktu nin telefone al +33-2.41.89.10.34 aŭ
retletere al kastelo@gresillon.org
aŭ letere al MCE Gresillon, St.Martin d'Arce,
49150 Bauge en Anjou, France.

Huan Liujun (Ĉinujo)

Virino kaj pentraĵoj

Li pentris la virinon tutajn kvin jarojn.
Kiu la virino estas, li neniom sciis. Li nur
memoris, ke iufoje dum vojaĝo li renkontis
nekonatan virinon en homplena vagonaro kaj
enamiĝis al ŝi je la unua vido.
De tiam li ekhavis malsanecan emon.
De tiam li ofte songis pri ŝi, kiu, alpreman-
te sin al li, observis lian pentradon pri riveroj kaj
montoj.

Iufoje li denove songis pri ŝi, kiu alvenis al li
ridetante.

Ĉe fervoja stacidomo li neintence tuŝis ŝian
manon. Kun siaj longaj haroj malpeze
flirtantaj, ŝi turnis sin, eltiris per sia malvarma
mano penikon el lia dorsosako kaj fuŝe pentris
sur sia korpo.

Tiufoje li iris malproksimen por pentri laŭ la
naturo.

Reveninte, li ne plu pentris florojn, herbojn,
birdojn, insktojn, klarajn fontojn kaj riveretojn.
Li dediĉis sian pentradon al la virino ridetanta,
koleretanta, kantanta, dancanta...

Dum kvin jaroj li pentris tri cent pentraĵojn pri
la virino..

Poste li faris turnean ekspozicion tra la lando
per tiuj tri cent pentraĵoj de la virino en
diversaj pozoj.

Li pensis kaj kredis, ke li certe renkontos ŝin
iutage, kaj la virino kaj pentrado same gravas
al li.

Post la turnea ekspozicio li rikoltis grandan
sukceson en famo kaj mono.

Ĉe homplena fervoja stacidomo, li pretis reiri
hejmen kun honoro. Subite virino, kun
flirtantaj longaj haroj, preterpasis lin...
samtempe, kiam li surprizite ekkriis, trijara
knabino demandis al ŝi, paŭtante: “Kial paĉjo
ankoraŭ ne revenis, panjo? Se li ne tuj jam
revenos, ni ne plu atendu lin kaj ni reiru
hejmen.”

De tiam li formis malsanecan emon. Precize li
estis sendita en hospitalon de mensa malsano,
kune kun siaj tri cent pentraĵoj.



Elĉinigis Kanglong (Ĉinujo)

Rosana Arbelo (1964—)



Sen timo

Sen timo sentu la favoron de la sorto,
teksitan de feinoj, kiuj ŝirmas vian vojon.
Farante ĉiun paŝon via plej vivinda horo,
Feliĉu do sen timo.

Sen timo, problemon ni rigardas bagatelo
La stratoj evoluas al ĉielo
Kaj ni fariĝas birdoj, flugantaj super tero, jen
Sen timo, la noktoj nin regalas per falstelo
Vi revu, plenumiĝos ĉiu revo
se vi volonte vivas
Sen timo al frenezo, sen timo diri: ne!

Sen timo sentu la favoron de la sorto,
teksitan de feinoj, kiuj ŝirmas vian vojon.
Farante ĉiun paŝon via plej vivinda horo,
Feliĉu do sen timo.
Sen timo, la spertoj gvidas nin al la libero
Se ni la manojn levas en aero
Ni trovos je dispono la tutan universon, jes
Sen timo, ni venas plej facile al la celo
Vi revu, plenumiĝos ĉiu revo
Se vi volonte vivas
Sen timo al frenezo, sen timo diri: ne!

Sen timo sentu la favoron de la sorto,
teksitan de feinoj, kiuj ŝirmas vian vojon.
Farante ĉiun paŝon via plej vivinda horo,
Feliĉu do sen timo.
Problemon ni rigardas bagatelo
Ni venas plej facile al la celo
Sen timo al frenezo, sen timo diri: ne!

Sen timo sentu la favoron de la sorto,
teksitan de feinoj, kiuj ŝirmas vian vojon.

Farante ĉiun paŝon via plej vivinda horo,
Feliĉu do sen timo.

Kanto: Sen timo (Sin miedo)

Verkis kaj kantas: Rosana Arbelo

Tradukis



Svena Dun (Hispanujo)

Ĉineske

Veĵdo (Ĉinujo)



VIZITO AL ANTIKAŬA URBETO

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Por ni tri
estas plezura
la vizit' al l' urbeto.
Igas pejzaĝo rura
la koron pura.

Fluetas
tre klara roĵo
ronde ĉirkaŭ l' urbeto.
Paŝas sur kota vojo
homoj kun ĝojo.

En bazar'
navedas homflu'.
Libere el kamplabor'
Homoj sin distras kun ĝu'
kun babila bru'.

Ŝtonponto
Staras impone.
Ĝi vidas travivaĵojn
pasintajn nepardone
kaj atest-done.

Muelil'
laboras pene
jen por mil familioj,
spite modernon plene
zumas senĝene.

Kabanoj
el lign' fortika
spertas cent-jaran provon
de ŝtormo pereiga,
tondro panika.

Kampuloj
simplaj en paco
kamplaboras kaj vivas
de natura donaco
sen ajna laco.

Volontas
ni ne foriri
de la aminda tero
jen kun emo sopiri,
bedaŭr' suspiri.



Miric Jadranka (Serbujo)



dolĉaj ammemoroj

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*
Naturkant'.
Suno oriĝas
sur ĉiela arkajo.
Lanteme ĝi ruĝiĝas.
Jam vesperiĝas.

Eklumis

Lun' aperanta.
Agrabla paca vesper'.
Pro venteto blovanta,
pro vi pasanta.

Via vang'
zebre strekita
pro ombreto falinta,
de la floro plukita
al vi donita.

Via rid',
kiel venteto.
Tenera animkiso.
La rava hejmbildeto.
Jen mi — poeto.

Bluas stel'
alte sur ĉiel'.
Kosma bonvenon al mi.
Ĉu mi respondu iel?
Venkas lipmiel'.



Mandio (Ĉinujo)

Majaj koloroj

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*
En majo
floroj en prosper'
disfloras ĉie sur mont'
kun aromo en aer'
ŝvebanta sur ter'.

Ruĝkolor'
sur la verda fon'
farbas arbojn helbrile

punktas sur freŝa gazon'
jen fajra sezon'.

Flav-ruband'
sterniĝas glime
ĝis la supro de l' monto
nuance malproksime
vere senlime.

Kiel gaz'
blanka la kolor'
strias kruce libere
muare en suna glori'
per bela dekor'.

Purpuraj
pecoj en malhel'
kuŝas en herbaj tufoj
des pli elstare kun bel'
flagre en ventpel'.

Kia mond'
flora en somer'!
Naturo al homaro
prezentas ĝin per mister'
kun tuta ofer'.

**Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforna poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimarango xa,xa,a (x=senrima).*

Vejdo (Ĉinujo)

Maja kaprico

—laŭ ĉinesko Shaonianyou*
Subite vipas pluvpel'
sub sunluma hel'
la pavimon
la pasantojn
sen preta ombrel'.

Ili forfuĝas ĉien
jen sen ajna cel'
de pluva ban'

de akva frap'
de vipa kruel'.

Abrupte ĉesis pluv' nun,
elvenas la sun'.
Kun vaporo
en aero
ĝi bakas per pun'.

Volvataj de varmego
sed en briza zum'
homoj sentas
sin komfortaj
en friska brakum'.



**Shaonianyou (Vojaĝo en juneco): ĉina fiksforna poemo el du strofoj kun po 5 versoj de 7,5,445 /75,445 silaboj, laŭ rimarango a,a,xxa / xa,xxa (x= senrima)*

Yanke (Ĉinujo)

Kiam vi forestis

—laŭ ĉinesko Nangezi*
Pro via forest'
veante plore
mi jam fartis langvore
studis, laboris malfervore.

Pro via forest'
mi pripensis nur
la tagnoktojn kun plezur'
kune kun vi en ama murmur'.

Pro via forest'
mia apetit'
perdiĝis, mia vizit'
al kinej' foriĝis je subit'.

Pro via forest'
mi kvazaŭ en mort'
pasigis tagojn sen fort'
malgraŭ endoma varma komfort'.

Mi ne povis min
savi el dilem'.
Sufiĉas via kompren',
via ĉionfanda ĉirkaŭpren'

**Nangezi (Suda kanto): ĉina fikforma poemo el 4 versoj de 55,7,9 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,a,a (x=senrima)*

Sam (Ĉinujo)

Ni memoru tiujn geknabojn en mizero

okaze de Internacia Geknaba Festo

—laŭ ĉinesko Jiangchengzi*

La geknabojn en mizer'
sen paner'
sen esper'
ni memoru
firme kun sincer'.
Ni devas agi vere
sed ne nur
sur paper'.

Niaj kreskas en buter'
en liber'
kun fier'.
Ni al ili
diru per la ver'
ke ekzistas geknaboj
en malsat'
sur globter'.



**Jiangchengzi (Riverborda urbo): ĉina fikforma poemo el samaj du strofoj kun po 8 versoj de 7, 3,3,45,733 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,a,xa,xa (x = senrima)*

Maupassant (1850-1893)



Ŝi estis edukita en unu el tiuj familioj, kiuj enmemiĝante vivas, kaj daŭre ŝajnas malproksime de ĉio. Ili ignoras la politikajn eventojn, kvankam oni parolas pri ili dum la manĝoj. Sed la ŝanĝoj de registaro okazas tiel malproksime, tiom malproksime, ke oni parolas pri tio kvazaŭ pri historia fakto, kvazaŭ pri la morto de Ludoviko la 16-a aŭ la elŝipiĝo de Napoleono.

La moroj modifiĝas, la modoj sin sekvas, sed oni ne tre rimarkas tion en kvietaj familio, kie oni daŭre sekvas la tradiciajn kutimojn. Kaj se ajna tikla historio okazas en la ĉirkaŭaĵoj, la skandalo venas morti sur la sojlon de la domo. Nur, la gepatroj vespere interŝanĝas kelkajn vortojn pri tio, sed duonvoĉe, pro tio ke la muroj ĉie havas orelojn. Kaj diskrete la patro diras :

- Ĉu vi aŭdis pri tiu terura afero en la familio Rivaŭlo ?

Kaj la patrino respondas :

- Kiu iam kredus tion ? Estas horore.

Kaj siavice la infanoj alvenas en plenaĝon kun bendo sur la okuloj kaj la menso, ne dubante pri io, ne suspektante la sekretojn de la ekzistado, ne sciante ke oni ne pensas kiel oni parolas, kaj oni ne parolas kiel oni agas, ne sciante ke necesas militante vivi kun ĉiuj, almenaŭ pace armita, ne supozante ke oni estas senĉese trompita, kiam oni estas naiva, mokludita kiam oni estas sincera, malbone traktita kiam oni estas bona.

Unuj vivas ĝis la morto en tiu blindeco de honesteco, lojaleco, honoro ; tiom nekorupteblaj, ke nenio malfermas iliajn okulojn.

Aliaj, elrevigitaj ne bone komprenante, stumblas konfuzegitaj, malesperaj, kaj mortas sin kredante la ludilojn de escepta fataleco, mizeraj viktimoj de pereigaj eventoj kaj homoj aparte krimaj.

La Savinjolo edzinigis sian filinon Berta, kiam ŝi estis dek-ok jarojn aĝa. Ŝi edziniĝis kun Pariza junulo, Georgo Barono, kiu negocis al la Borso. Li estis bela knabo, bone parolis, havis ĉiujn necesajn honestajn eksterajojn, sed korfunde li mokis iom siajn subevoluintajn gebopatrojn, kiujn inter amikoj li nomis : "Miaj karaj fosilioj."

Li apartenis al bona familio, kaj la junulino estis riĉa. Li forkondukis ŝin vivi en Parizo.

Ŝi fariĝis unu el tiuj Parizaj provincaninoj, kies raso estas multnombra. Ŝi restadis nescianta de la granda urbo, ĝia eleganta mondo, ĝiaj plezuroj, ĝiaj kostumoj, kiel ŝi postrestis nescianta pri la vivo, ĝiaj perfidecoj kaj ĝiaj misteroj.

Enfermita en sia mastrumaĵo, ŝi praktike konis nur sian straton, kaj kiam ŝi sin riskis en alian kvartalon, ŝajnis al ŝi, ke ŝi efektivigis malproksiman vojaĝon en nekonata aŭ fremda urbo. Vespere ŝi diris :

- Hodiaŭ mi trapasis la bulvarojn.

Du aŭ trifoje ĉiujare, ŝia edzo forkondukis ŝin al la teatro. Estis festoj, kies rememoro ne malaperis, kaj pri kiuj oni senĉese reparolis.

Kelkfoje, post tri monatoj, sidanta ĉetabele, ŝi bruske ekridis, kaj ekkriis :

- Ĉu vi memoras pri tiu aktoro, vestita kiel generalo, kaj kiu imitis la kokan kanton ?

Ŝia tuta konataro limiĝis al du aliancaj familioj, kiuj konstituis por ŝi la homaron. Ŝi nomis ilin antaŭante ilian nomon per la artikolo "la" - la Martineto kaj la Miŝlino".

Ŝia edzo vivis laŭ sia volo, rehejmiĝis kiam li volis, iafoje ĉe la tagiĝo, pretekstante negocojn, tute ne sin ĝenante, certa ke neniam suspekto tuŝetos tiun kredeman animon.

Sed iun matenon ŝi ricevis anoniman leteron.

Ŝi restadis konfuzegita, havante tro lojalan koron por kompreni la malnoblaĵon de la denuncoj, por malestimi tiun leteron, kies aŭtoro sin diris inspirita de la intereso de ŝia feliĉo, la malŝatego de la malbono, kaj la amo de la vereco.

Oni rivelis al ŝi, ke de jam du jaroj ŝia edzo havis amorantinon, juna vidvino, S-ino Roseto, ĉe kiu li pasigis ĉiujn siajn vesperojn.

Ŝi sciis nek komedii, nek simuli, nek gvati, nek ruzi. Kiam li hejmen revenis por tagmanĝi, ŝi ĵetis al li la leteron, kaj plorsingultante forkuris en sian dormoĉambron.

Tempon li havis por kompreni kaj prepari sian respondon. Li iris frapi ĉe la pordo de sia edzino. Ŝi tuj malfermis, ne kuraĝante rigardi al li. Li ridetis, sidiĝis kaj altiris ŝin sur siajn genuojn, kaj per milda voĉo, iom mokema diris :

- Mia kara etulino, efektive mi havas amikino S-ino Roseto, kiun mi konas jam de dek jaroj, kaj kiun mi tre amas ; mi aldonus, ke mi konas dudekon da aliaj familioj, pri kiuj mi neniam parolis al vi, sciante ke vi ne tro ŝatas la mondon, la festojn kaj la novajn rilatojn. Sed por definitive ne plu paroli pri tiuj senhonoraj denuncoj, mi vin petus, ke post la tagmanĝo vi bele vestiĝu, kaj ni iros viziti tiun junan virinon, kiu fariĝos via amikino, mi ne dubas pri tio.

Ŝi plenbrake kisis sian edzon, kaj per unu el tiuj inaj scivoloj, kiuj ne plu endormiĝas kiam ili vekiĝas, ŝi ne malakceptis iri viziti tiun nekonatulinon, kiu tamen restis iom suspektinda. Ŝi instinkte sentis, ke konata danĝero estas preskaŭ evitita.

Ŝi eniris en ĉarman malgrandan apartamenton, plena da bagatelaĵoj, arte ornamita, ĉe la kvara etaĝo de bela domo. Post kvin minutoj da atento en salono mallumigita pro tapetoj, pordokurtenoj kaj kurtenoj ĉarme drapiritaj, pordo malfermiĝis kaj juna virino aperis, tre bruna, malgranda, iom grasa, mirigita kaj ridetanta.

Georgo faris la prezentojn :

- Mia edzino, sinjorino Julia Roseto.

La juna vidvino eligis etan krion pro miro kaj ĝojo; kaj impetis kun la du manoj malfermitaj. Ŝi ne esperis plu havi tiun feliĉon, ŝi diris, sciante ke S-ino Barono vidis neniun, sed ŝi estis feliĉa, tiom feliĉa... Ŝi amis tiom Georgon... (ŝi diris simple Georgon kun frata familiareco) ke ŝi tre deziris koni lian junan edzinon, kaj ankaŭ ami ŝin.

Post unu monato, la du novaj amikinoj ne plu forlasis unu la alian. Ĉiutage, ili sin vidis reciproke, eĉ ofte dufoje, kaj ĉiuvespere ili manĝis kune, jen ĉe unu, jen ĉe la alia. Nun Georgo ne plu eliris ofte, ne plu pretekstis negocojn, ŝategante, li diris, sian angulon apud la fajro.

Fine apartemento liberiĝis en la domo, kie loĝis S-ino Roseto, tuj S-ino Barono diligentis por akiri ĝin, por alproksimiĝi kaj kunveniĝi ankoraŭ plimulte.

Kaj, dum du plenaj jaroj, estis amikeco sen nubo, kora kaj anima amikeco, absoluta, tenera, sindonema, delica. Berta ne povis plu paroli ne prononcante la nomon Julia, kiu reprezentis por ŝi la perfektecon.

Ŝi estis feliĉa, el perfekta feliĉeco, kvieta kaj milda.

Sed jen S-ino Roseto malsaniĝis. Berta ne plu forlasis ŝin. Ŝi pasigis la noktojn, afliktiĝis, ŝia edzo mem estis malespera

Nu, iun matenon, dum la kuracisto vizitinte sian pacientinon kaj estis elironta, li aparte rilatis kun Georgo kaj lia edzino, kaj anoncis al ili, ke li trovis tre grava la sanstaton de ilia amikino.

Tuj kiam li estis foririnta, la gejunuloj konsternitaj sidiĝis unu vidalvide la alian, poste ili subite ekploris. Ili noktoflegis ŝin, ambaŭ kune apud la lito de la suferanta. Berta, ĉiumomente, tenere kisis la malsanulinon, dum Georgo staranta piede de ŝia kuŝejo silente rigardadis ŝin kun ega persisto.

La postan tagon Julia ankoraŭ pli malbone fartis. Fine, vespere ŝi deklaris, ke nun ŝi plibone fartas, kaj petis siajn geamikojn, ke ili remalsupreniru por vespermanĝi hejme.

Ambaŭ malgaje sidis en sia manĝoĉambro, ne multe manĝante, kiam la servistino transdonis koverton al Georgo. Li malfermis kaj legis ĝin, tuj li fariĝis livida, kaj sin levante diris al sia edzino kun stranga mieno : "Atendu min, necesas, ke mi forestiĝu dum momento, mi revenos post dek minutoj. Precipe ne eliru."

Kaj li kuris en sian dormoĉambron por ekpreni sian ĉapelon.

Berta atendis lin, turmentata pro nova maltrankvilo. Sed obeema en ĉio, ŝi ne volis resupreniri ĉe sia amikino antaŭ, ol li estu reveninta.

Ĉar li ne reaperis, alvenis al ŝi la penso, ke ŝi iru en lian dormoĉambron por vidi ĉu li prenis siajn gantojn, tiu kiu montris al ŝi, ke li devis eliri ien.

Ekde la unua ekrigardo ŝi ekvidis ilin, kaj ankaŭ rimarkis ĉifan paperon, ĵetitan tie, kiu kuŝis apud ili. Tuj ŝi rekonis ĝin, temis pri tiu, kiun oni ĵus transdoni al Georgo.

Kaj varmega tento, la unua de ŝia vivo, alvenis al ŝi : legi kaj scii. Ŝia ribela konscienco batalis, sed la juko de vipita kaj dolora scivolo puŝis sian manon. Ŝi ekkaptis la paperon, malfermis ĝin, kaj tuj rekonis la skribmanieron de Julia, tremeta skrimaniero per krajono. Ŝi legis : "Ci venu sola por min brakumi, mia povra amiko, mi tuj mortos."

Unue ŝi ne komprenis, kaj restis tie stulta, ĉefe trafita de la ideo de morto. Poste, subite la uzado de la cidirado ekkaptis ŝian penson,

